

Esperanto en Svislando, 6-a parto

La interna ideo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 443 1972.04.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni prezentas al vi historion de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo *Svisa Espero*.

A.- Tiun ĉi jaron, okaze de sia Ĝenerala Kunveno, la membroj de Svisa Esperanto-Societo decidis, ke la titolo *Svisa Espero* estas ridinda. Estos organizata konkurso por trovi novan pli taŭgan titolon por nia svisa revuo.

Cl.- Tiu decidos pruvas, ke la mistiko, kiu karakterizis la esperantismon en la komenco de nia jarcento, ne plu respondas al la nunaj ideoj, kiujn oni havas pri la rolo de esperanto. Esperanto ĉesis esti nura **espero**. Ĝi fariĝis realaĵo.

A.- En la espero de la unuaj esperantistoj la lingvo internacia de Zamenhof devis alporti rapidan solvon al multaj sociaj konfliktoj. Tio konstante esprimiĝas en prozaj aŭ poeziaj tekstoj, kie iuj vortoj aŭ esprimoj svarmas : glora Majstro, sankta Afero, stelo, verda standardo, ĵuri, oferi, solene promesi, kredi, nekredemuloj, pacaj batalantoj, kaj tiel plu.

Cl.- Hodiaŭ tiaj tekstoj vekas ridetojn. Inter 1900 kaj la fino de la unua Mondmilito ili konkretigis tion, kion la esperantistoj nomis la **Interna Ideo**.

A.- Ni citos al vi diversajn tekstojn el *Svisa Espero*, kie esprimiĝas tiu Interna Ideo. Jen kelkaj frazoj el artikolo titolita *Nia arbo*, kiu aperis en junio 1903 :

Cl.- « *Verda arbo kreskadas jam de kelka tempo kaj etendas pli kaj pli sian densan foliaron super tio kio ĝin ĉirkaŭas; ĝiaj radikoj ĉerpas la sukcon per kiu ĝi nutriĝas el ĉiuj teraĵoj. [...] Ĝia nomo estas « Esperanto » kaj ĝia ombro malaperigas jam ĉiujn arbojn kiuj kreskis ĉirkaŭ ĝi.* »

A.- Tiu arbo estas la aliaj projektoj de internaciaj lingvoj, kiel Volapük, Idiom Neutral, Universal Glott, kaj tiel plu. Ni daŭrigas nian citadon :

Cl.- « *La branĉoj de nia arbo kovras jam multe da landoj kaj la civilizitaj popoloj ekgustumas de nun ĝiajn unuajn fruktojn. Ian proksiman tagon ĝia foliaro kovros la tutan mondon dum ĝiaj radikoj same ĉerpos la vivon en ĉiuj landoj, alkondukos ĝin al la trunko kaj tiu vivfonto nutrita de ĉiuj popoloj disdonos al ili ĝiajn fruktojn, tio estas la feliĉo kaj la universala frateco.* »

A.- Legante similajn tekstojn oni havas la impreson legi erojn el bibliaj profetaĵoj. Aŭskultu :

Cl.- « *Steleto brilas super la pinto de nia arbo ; ĝi estas supera stelo. Ju pli la arbo kreskas kaj grandiĝas, des pli la steleto brilas ; la dolĉa lumo de espero iom post iom fariĝas ora flamo kaj la humila steleto brilos baldaŭ kiel triumfa astro.* »

A.- Tiu profetismo pri la saviga rolo de esperanto ankaŭ esprimiĝas en *Marŝo de Esperantistoj*, poemo kiun aperigis *Svisa Espero* en januaro 1904 :

Cl.- « *Senlace, senhalte, sen ripoz' kaj timo
De spirit' kuraĝaj, fidelaj al celo,
Kun varma espero en nia animo
Fiere ni portas standardon kun stelo.
[...]*

*En marŝo rapida, kun ĝojo en koro
Tra la tuta mondo amase ni iras
Kaj, barojn venkante sen glavo, sen oro,
Prosperes sur vojo ni anojn akiras.*

*Multiĝas kun ĉiu tag' nia armeo
En nia batalo fervora, obstina
En paca batalo por sankta ideo
Por celo tre glora, humana kaj fina.*

*Disvolu la belan standardon kaj tenu
Super niaj kapoj ĝin alte, anaro,
Por ke ni ĝis fino batalon elenu
Kaj por ke nin benu venonta homaro. »*

A.- En la du lastaj strofoj estas anoncata la malapero, dank'al esperanto, de la militoj, de envio, profitemo, malamo, profite al ĉiunacia fratiĝo kaj amo. Aŭskultu :

Cl.- « *En nelacigebla kaj spirita forto
Kun kora alvoko, kun hela espero,
Ni venkos la mondon, kreinte per vorto
Da amo revatan epokon sur tero.*

*Tiam malaperos sur ĝi sangbatalo
Envi', profitamo, perforto, malamo
Kaj anstataŭigos ilin idealo
De ĉiunacia fratiĝo kaj amo. »*

A.- En la esperanto-kursoj oni ne nur instruis la lingvon internacian, oni anoncis ankaŭ tiujn profetaĵojn kaj oni solene promesis la lernantojn fariĝi fidelaj batalantoj por tiu sankta kaj fervora batalo. En decembro 1910 *Svisa Espero* aperigis tre interesan raporton de Henriko Fridöri, instruisto en Zuriko. Temas pri « *Spertoj faritaj dum la instruado de Esperanto al dekdujaraj knaboj.* » Koncerne la 50-an kaj lastan lecionon, jen tio, kion ni legas :

Cl.- « *Mi rakontis al ili*

A.- (do al la dekdujaraj knaboj)

Cl.- *Mi rakontis al ili – kiel jam antaŭe kelkfoje – pri la sankta celo de l' esperanta movado, pri nia genia majstro D-ro Zamenhof kaj ili solene promesis al mi, esti fidelaj batalantoj por Esperanto, neniam ĝin perfidi. »*

A.- En la sama numero de *Svisa Espero* oni dividas la homojn laŭ du grupoj : la esperantistoj kaj la nekredemuloj. Aŭdu :

Cl.- « *Montru tiun libreton al nekredemulo.* »

A.- En aprilo 1908 estas anoncata la kvara Universala Kongreso de Esperanto en Dresden. Kion vi dirus, se ĉijare en la invito por iri al la UK en Toronto, vi trovus tiun ĉi frazon ?

Cl.- « *Ili ĉiuj venu, la pacaj batalantoj por nia sankta afero.* »

A.- Vi verŝajne opinius, ke sinjoro doktoro Ivo Lapenna aŭ unu el liaj helpantoj bezonus iri ripozi por retrovi mensan ekvilibron. Estas, ke ni ne plu vivas en la sama epoko. Ni povus multigi tiujn citaĵojn. Aŭskultu ankoraŭ tiun ĉi, ĉerpita el *Svisa Espero*, majo 1908 :

Cl.- « *S-ro Hodler recitas kun Zamenhofeca kortuŝa voĉo la famajn versojn de nia majstro **Preĝo sub la verda standardo.*** »

A.- En tiu mistiko ne nur steloj, standardo, ĵuroj, sed tre verŝajne ankaŭ recit-metodo ludis rolon. Jen en kia etoso disvastiĝis nia lingvo komence de la dudeka jarcento.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !